

William Blake,

## La tigro

*tradukita de William Auld*

Tigro, tigro, brile brula  
 En arbaro nokt-obskura,  
 Forĝis kia man' eterna  
 Vin je simetri' konsterna?

En kia fundo aŭ ĉielo  
 Ardis via okulhelo?  
 Kia lin flugil' subtenis?  
 Kia man' la fajron prenis?

Per kiaj ŝultro kaj kompreno.  
 Por vi tordiĝis kortendeno?  
 Kaj kiam pulsas batoj koraj,  
 Kiaj pied' kaj mano gloraj?

Kia martelo? Ĉeno kia?  
 Kia forn' por cerbo via?  
 Riskis kia fort' kolosa  
 Spiti al terur' ambosa?

Kiam steloj sin malarmis  
 Kaj sur la ĉielon larmis,  
 Ĉu la verko al li karis?  
 Ĉu vin Ŝafid-farinto faris?

...

William Blake,

## Der Tiger

*tradukita de Walter A. Aue*

Argiope-informo:  
 La aspekto de tiu ĉi versio estas barita.  
 Supozeble la aŭtoro decidis tion.

...

Tigro, tigro, brile brula  
 En arbaro nokt-obskura,  
 Forĝus kia man' eterna  
 Vin je simetri' konsterna?

*Traduko de la Angla poemo "The Tyger " de WILLIAM BLAKE (\*1757-11-28 – †1827-08-12) en Esperanton de WILLIAM AULD (\*1924-11-06 – †2006-09-11).*

*Arg-1048-2127 (2014-06-08 19:35:19)*

*Tiun ĉi poem-esperantigon mi, Manfred Retzlaff, trovis en la retejo <http://donh.best.vuh.net/Esperanto/Literaturo/Poezio/tigro.html>.*

*Traduko de la Angla poemo "The Tyger " de WILLIAM BLAKE (\*1757-11-28 – †1827-08-12) en la Germanan de Walter A. Aue.*

*Arg-1048-2126 (2014-06-08 19:55:12)*

*Tiu ĉi poem-germanigo troviĝas en <http://myweb.dal.ca/waue/Trans/Blake-Tiger.html>.*